

Leterkesto-6 kaj kristnaska kanto el la pola disko Kristnaskaj kantoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 decembro 22.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-30/SRI-1988-30-B-6-Claude-kaj-Andree-Gacond-Leterkesto-6-kaj-kristnaska-kanto-el-la-pola-disko-Kristnaskaj-kantoj.mp3>

Cl.- Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond parolas nome de Svisa Radio Internacia kaj daŭrigas sian salutadon al la skribemaj geaŭdantoj.

Hodiaŭ ni komencu salutante Przemyslaw MLYNCZYK en Varsovio, Pollando, kiu realigis pollingvan elsendon pri ESPERANTO, kiu estis konstruita el dokumentaj materialoj, kiujn li surbendigis dum la 72-a Universala Kongreso en Varsovio.

A.- La revuo MONDO DE UNIVERSITATO eldonita en esperanto kaj en la korea de la Instituto de Dankook Universitato, Sudkoreujo, indas je atento. Jen kiel la eldonanto d-ro Chang Conoon-sik, prezidanto de Dankook Universitato kaj de Korea Esperanto-Asocio, raportas pri la sukceso de la unua numero. "Eldoninte 500 ekzemplerojn kaj ilin dissendinte, mi atendis de la legantoj la reagojn. Enlande, de diversaj universitatoj, altaj edukaj institucioj kaj ĵurnalejoj venis pozitivaj reagoj kaj eĉ alvenis mendoj tute neatenditaj, tiel ke mi devis plimulti la nombron de la ricevantoj de la revuo. Aliflanke, ankaŭ el alilandaj asocioj de Esperanto kaj radiostacioj venis afablaj kaj detalaj reagoj kun granda intereso... Stimulite de tiuj ĉi faktoj, de ĉi jaro mi intencas duobligi la eldonkvanton kaj la oftecon de la eldono, tiel ke mi povu respondi al la intereso de la legantoj kaj pliaktive movadi." - fino de la citaĵo.

Cl.- Ni diru kelkajn vortojn pri la artikoloj aperintaj en la dua numero de 1988. Ni ŝatus multon citi el la artikolo "Por havi veran pacon" de la fondinto de Dankook Universitato, s-ro Chang Hyong. Jen kelkaj vortoj medigitaj: "Konflikto ekestas tiam, kiam kolizias la pensoj, ke mi estas aŭ supera aŭ malsupra al aliaj homoj. Tiu ĉi fenomeno okazas ne nur inter individuoj, sed ankaŭ inter socioj kaj nacioj. Reale en nia socio arogante kondutas edukitoj al needukitoj, riĉuloj al malriĉuloj kaj potenculoj al malpotenculoj, havante la memfieran penson, ke mi estas supera al vi. En tia kazo la ofenditaj homoj nature ekhavas antipation kontraŭ la arogantuloj kaj kovas en la koro venĝemon. Ĝuste pro tio naskiĝas tumulto en la socio kaj eksplodas milito inter nacioj kaj fine malaperas paco inter homoj." - fino de la citaĵo.

De Helmar FRANK aperis longa disertacio pri la Propedeŭtika Valoro de la Internacia Lingvo", artikolo analizinda de ĉiuj, kiuj agadas favore al la instruado de esperanto en la lernejojn. Ni deziras longan kaj utilan vivon al tiu revuo titolita Mondo de Universitatoj.

A.- La revuo MONATO fariĝas pli kaj pli originala raportaro pri la hodiaŭaj mond-eventoj. Tiuj artikoloj ne ĉiam kongruas kun la kutimaj novaĵoj, kiujn ni legas en niaj nacilingvaj gazetoj. Tio estas bonvena. Ili alportas kompletigajn vidpunktojn.

Cl.- Mi salutas NEILANDE en Riga, Estonio.

Bruno NAJBARO en Keighley, Britio, kelfoje baraktas kun aŭdproblemoj, kaj pri tio raportis en siaj preskaŭ ĉiusemajnaj perpoŝtkartaj aŭskultraportadoj. Sed subite, ŝanĝante la aparaton li konstatis, ke ne kulpis nia radio, sed lia malnova aparato. Ni citas lin: "Ĉi vespere mi eltrovis, ke kulpas mia malnova aparato. Sur la nova mi aŭdis kontentige vian programon." -

fino de la citaĵo. Estas fakto, ke por kontentige aŭskulti kurtondajn elsendojn, oni devas posedi specialigitan ricevilon.

A.- NEDERLANDA SOCIETO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ havis sian estrar-kunsidon, kiam ni aŭdigis intervjuon kun Roy McCoy. Tiu elsendo kreis bonan etoson en ilia kunveno, ĉar post la aŭskultado ili vigle diskutis pri la aŭditaĵoj. Ni salutas la membrojn de tiu komitato: Jan BEMELSMANS, Nora REINDERS, Jos WICHMANN kaj Rob MOERBEEK.

Cl.- NORVEGA ESPERANTISTO en sia numero 1/1988 raportas tion ĉi koncerne al radiodissendado pere de sia Komisiito Otto PRYTZ. Ni citas : "Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto kaj ĝia celebrado en Norvegujo estis ĝojige multaj radio-programeroj pri Esperanto. Daŭris la tendenco de la lastaj jaroj, ke mencio de Esperanto pli ofte aperas en lokaj privataj radiostacioj kaj en regionaj programoj de la ŝtata radio, ol en la tutlandaj programoj. La komisiito registris entute 37 menciojn kaj intervjuojn, el kiuj 26 lokaj kaj regionaj, 10 tutlandaj, kaj nur unu mencieto en televido."

A.- Saluton al Eva NOVAKOVA en Most, Ĉeĥoslovakio.

Ronald NOBEL en Nijmegen, Nederlando, verŝajne estas adepto de vir-seksa sufikso. Li titolas sin frauliĉo. Laŭ tiu uzo la vortelemanto estus neŭtrala rilate al la sekso. *Sinjoro* signifus do *sinjoro* aŭ *sinjorino*, kaj por indiki la sekson oni devus diri *sinjoriĉo* kaj *sinjorino*.

Cl.- Ni alproksimiĝas al Kristnasko kaj ni ricevis el Pollando diskon, titolita 'Kristnaskaj kantoj'. Vi aŭdas el tiu disko la trian kanzonon: 'En Betlehemo'.

(muziko)

Cl.- Kantis 'Marcelli Robert, Miroslav Svadka, Henrik Onisek, Julius Gebalski, Jan Psiut, Jan Sotisek' el Pollando. Ni salutas ilin kaj ni ankoraŭ salutas

Franz OKELMANN en Bayreuth, Germanio okcidenta,

s-ro PACKARD en Eastleigh, Britio,

Jiri PATERA en Ĉeĥoslovakio.

Zbigniew PATEREK en Ostrow, Pollando, surbendigas niajn elsendojn por utiligi ilin dum esperanto-kunvenoj, kiujn li prezidas. Ni salutas lin kaj liajn klubanojn dezirante al ĉiuj fruktodonan klub-laboron.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND salutas vin kaj deziras al vi bonajn Kristnaskajn festojn. Ĝis reaŭdo!